

BULTENO

de GERMANA ESPERANTA FERVOJISTA ASOCIO

Mitteilungsblatt der Vereinigung deutscher Eisenbahner-Esperantisten im Bundesbahn-Sozialwerk



Fondita 1952

Numero 4

septembro 1988



Höchste Zeit . . .

ist es, sich für das Jahrestreffen der Vereinigung deutscher Eisenbahner-Esperantisten vom 7. bis 9. Oktober 1988 in Kaiserslautern anzumelden.

Aus der Geschichte von Kaiserslautern

12. Jahrhundert

Kaiser Friedrich I Barbarossa läßt im Dorf Lautern einen Palast errichten.

13. Jahrhundert

König Rudolf I von Habsburg verleiht die Stadtrechte.

14. Jahrhundert

Unter Kaiser Ludwig IV geht die Reichsfreiheit durch Verpfändung der Stadt wieder verloren.

16. Jahrhundert

Bau des Renaissanceschlusses.

17. Jahrhundert und später

Spanier, Schweden, Kroaten, Franzosen und Bayern erobern und herrschen.

18. Jahrhundert

Napoleon führt das französische Gesetzeswerk ein; es gilt bis 1900.

19. Jahrhundert

Beginn der Industrialisierung (Eisenbahn, Pfaff-Nähmaschinen).

1987

Am Eingang der Altstadt wird der Kaiserbrunnen errichtet.

W.B.



Gruppenaufnahme vor dem „Löwenburger Hof“ (s.S. 2, Bericht Köln)

Aus den Gruppen

Köln

Am 7. Mai 1988 trafen sich 26 Eisenbahner-Esperantisten, davon 8 aus dem Bezirk Essen, mit ihrem Bezirksbeauftragten am Bahnhof Königswinter zur diesjährigen Frühlingswanderung. Von der Margarethenhöhe ging es auf den zweithöchsten Berg des Siebengebirges, auf den Löwenberg mit seiner restaurierten Löwenburg.

Bei gutem Wanderwetter wurde die vom Bezirksbeauftragten Erh. Herlitze erklärte Landschaft und Umgebung bewundert, den Siebengebirgs- und Drachenfelslegenden aufmerksam zugehört. Aber auch die umfangreichen Waldschäden, hervorgerufen durch Milben, Raupen und Umweltverschmutzung, verdienten staunende Beachtung.

Nach dem Mittagessen wanderte die Gruppe vom Löwenberg in ca. 1 1/2 Stunden auf den sagenumwobenen Drachenfels. Unterwegs berichtete Dr. Kondor aus Neuwied über seine tatkräftige Mithilfe bei der Unterstützung von Leprakranken in den verschiedensten Ländern.

Nach einem gemeinsamen Kaffeetrinken in Königswinter reisten die Teilnehmer zufrieden heimwärts mit der Bitte, um baldige erneute Begegnung bei einer Wanderung.

Bremen

Vom 10. — 12. 6. fand die Esperanto-Konferenz Niedersachsens 1988 in Undeloh in der Lüneburger Heide statt. Das Arberger Dorffest findet vom 16. — 18. 9. statt. Die Gruppe wird einen Informationsstand einrichten.

El la fervoja mondo

Hindio:

„Begamo de la stacidomo“
ŝi ricevis novan rezidejon.

Dum dek jaroj islamana princino en Hindio, Begum Wilayet Mahal, vivaĉis kontraŭleĝe en stacidomo de Nov-Delhi energie postulante redonon de palaco. Nun ŝi ricevu novan rezidejon.

Per sia memelektita „ekzilo“ en la stacio, la Begamo, ĉefino de iama princa familio, volis perforte devigi redonon de la palaco kiu laŭ ŝia konvinko estis maljuste senproprigita de la Britoj kaj retenita de la registaro hinda.

Ĉinio:

Pli rapide al Kowloon
La 117 km longa unutraka etapo de Guangzou al Shenzhen de la fervoja linio Guangzou — Kowloon (Hongkong) fariĝos dutraka. Samtempe la linio estas elektrizata kaj kelkaj interaj stacioj renovigataj. Post fino de la modernigadaj laboroj la veturdaŭro al Kowloon de nuntempe tri horoj kaj tridek minutoj malpliĝas je la duono.

Sudafriko:

Plej pezaj vartrajnoj sur etŝpura fervojo
Sudafrikaj fervojoj strebas al nova mondrekordo sur etŝpuro (1 067 mm). Post fino de la kuranta relvojpilbonigado sur la karbofervojo de Ermelo al Richards Bay trafiku la plej longaj trajnoj el ĉiuj etŝpuraj linioj sur la mondo. Kun la ekfunkciigo oni jam kalkulas en la venonta jaro. Kvar elektra lokomotivoj tiam transportos trajnojn kun 200 varvagonoj. Ĉe trajnlongeco de 2 684 m estu transportataj la ŝarĝoj de 23 000 tunoj.

El Blickpunkt

Aŭstralio:

Pluaj elektrizadoj en Kvinslando

Ankoraŭ ĉi-jare la Kvinslandaj Fervojoj kalkulas kun la fino de la kurantaj elektrizadlaboroj ĉe la antaŭurba reto de Brisbane kaj la konekslinio de Gladstone al la karbobaseno de Goonyella. Tuj poste komencos la elektrizado de la 475 km longa linisekcio de Brisbane al Gladstone. La fino de la laboroj ĉe la 307 milionojn kosta projekto estas antaŭvidita por la jaro 1989. Post tio la vojaĝdaŭro inter Brisbane kaj Rockhamton mallongiĝos je kvin horoj kaj kvardek minutoj al ok horoj kaj tridek minutoj. Ankaŭ la vartrafiko profitos pro la ŝanĝo al elektra trakcio.

KIMRUJO VALORAS VOJAĜON

Al Trilanda Markola renkontiĝo de fervojistoj invitis Lucien de Sutter (B) - kaj el ok landoj venis 55 partoprenantoj al Kimrujo, al senindustria urbeto Abergavenny en la graflando Gwent - nomoj neniam antaŭe aŭditaj sed nun neforge-seblaj por ĉiu de la 8.8.88 ĝis la 15a de aŭgusto estis tie. Oni kunloĝadis dum tuta semajno kiel granda familio, prizorgita en komfortaj ĉambroj, per zorgeme kaj rapide servitaj manĝoj laŭ angla kuirmaniero.

La domo sur „La Monteto“ iam estis kampodomego de mineja barono, situanta en flegita parko, nun ĝi estas kolegiejo kun loĝebleco por 82 personoj (maksimume). En duonjara programkajero la dommastro John Newcombe ofertas kursojn kaj aranĝojn pri tre variaj temoj, ekzemple pentrado, renesanca muzikado, genealogio, regiona migrado, teniso, karateo, teksado, literaturo, lingvokursoj francaj, germanaj, rusaj, kimraj, Esperanto - por citi nur kelkajn.

Samtempe kun nia renkontiĝo okazis kurso pri „flikaĵkudrado“ (patchwork) kaj okaze de nia vizito al Kimra Folkloro Muzeo ni eĉ revidis buntajn litkovrilojn tiamaniere kudritajn, en pajle tegmentita kamparana domo. La ekskurso tien - proksime de Cardiff - estis unu el la plej interesaj dum tiu eventoriĉa semajno. Aliaj celoj estis la „urbo de la floroj“, Bath, kun fama abatejo, varmaj fontoj kaj vizitindaj romiaj banejoj; la urbo Newport kun unika specialponto, sur kiu oni ne povas veturi, sed sub kiu ŝvebas super la akvo, pendanta je rulĉareto, pramosimila boato, en kiu oni transportas aŭtojn ktp de unu bordo al la alia; la Nacia parko Brecon Beacons kun mirinde bela, vasta pejzaĝo kaj kun eŝpura montara fervojo, kies vaporlokomotiveto nomiĝas „Graf Schwerin-Löwitz“ kaj venis el Germanio;

iam karbominejo „Big Pit“, nun funkcia kiel muzeo, en kiu ni - ekipitaj per kasko kaj lampo - 92 metrojn subtere povis observi, kiel kaj kie laboregis homoj, infanoj, ĉevaloj por ekspluati karbominejon; laste per boatoj oni trapasis idilian pejzaĝon sur kanaloj - ĉe pluvema vetero bedaŭrinde.

Serioza diskutemo dumtage estis kiamaniere plibonigi la situacion en kelkaj landaj asocioj de IFEF. Sekvis organizaj kunsidoj de la tri gastigantaj fervojistaj unuiĝoj (B, NL, GB). Ĉiuj vesperaj lumbildprezentadoj trovis grandan intereseon, eĉ kiam fariĝis tro malfrue: pri vojaĝo per la transsiberia fervojo al Ĉinio (Jan Niemann, DK), pri mondfamaj kaj pri mepentritaj ikonoj (Greta Deutsch, D), pri fruaj vapormaŝinoj kaj lokomotivoj (John Sykes, GB), pri la pentristo Marc Chagall (Gernot Ritterspach, D) kaj laste pri vojaĝmemoroj de veterano (Horace Clayton, GB). La urbestro de Abergavenny persone vizitis nian aranĝon kaj la loka gazeto Abergavenny Chronicle raportis kun granda foto.

La lasta vespero estis ankaŭ la kulmino. Ĉiuj reprezentitaj landoj estis invitataj iel kontribui al la distra programo! Oni ludis, kantis - eĉ kimre -, muzikis sur fortepiano, prezentis anekdoton ktp. Emocie oni dankis al Petro Harvey kaj al lia edzino Peggy pro ilia multjara sindona laboro por la Brita Asocio de Esperantistaj Fervojistoj (BAEF), kaj kuraĝige oni enkondukis lian novan, junan kaj aktivan posteulon Alan Burgess el Yorkshire, kies edzino ankaŭ estis en la rondo. - Apartan dankon al John Dickinson el Abergavenny, kiu kun ĉiama rideto volonte subtenadis la organizanton Lucien de Sutter kaj ĉiun ajn, kiu bezonis helpon aŭ konsilon. Ritt

Svislando:

BLS - pasaĝervagon - stoko renovigata
La svisa Bern-Lötschberg-Simplon Fervojo (BLS) renovigas nuntempe sian pasaĝervagon-stokon. En la venontaj jaroj tiu privata fervojo enservigos 18 novajn klimatizitajn pasaĝervagonojn (sep unuaklasaj

kaj dekunu de dua klaso). Ili unue ruliĝos en IC-trafiko sur la linioj Brig-Basel-Interlaken-Zürich-Flughaveno. La novaj BLS-vagonoj en svisa enlanda trafiko povos esti kunigataj pli facile kun la vagonoj de la SBB.

El Blickpunkt

Norvegio

La norvega esperantista ligo reviziis la broŝuron NORVEGUJO kun 16 paĝoj da teksto kaj 8 paĝoj kun kolorbildo, eldonita de Reĝa Ministerio pri Eksteraj Aferoj.

Senpage estas havebla ĉe Norvega Esperantista Ligo, Olaf Schous-vei 18, N-0572 Oslo 5.

Saudi-Arabio

Antaŭ nelonge nova fervoja linio ekfunkciis inter la ĉefurbo Riad kaj haveno Damman ĉe la Persa Golfo. Ĝi malpliigas la distancon 571 km al 450 km kaj la vojaĝdaŭron de sep al kvar horoj. Tiuj trajnoj trafikas senhalte inter ambaŭ urboj. Ankaŭ por vartrafiko la nova linio estas tre grava.

Koresponi deziras:

Pola fervoja inĝeniero deziras koresponi kun germanaj gekolegoj. Lia adreso: Jerzy Michalski, ul. Pocztowa 9, 26-600 Jedlinsk. Pollando.

Esperanto-Fernkurs n e u

Esperanto ist eine internationale Sprache. Die Grammatik ist einfach und logisch; sie besteht nur aus wenigen kurzen Regeln. Es gibt keine Ausnahmen und Unregelmäßigkeiten.

Esperanto wurde für die internationale Kommunikation geschaffen.

Der neu aufgelegte Esperanto-Sprachkurs mit Lehrbuch, Tonbandkassette und brieflicher Betreuung ermöglicht es, daß jeder zu Hause Esperanto lernen kann. Zeitpunkt des Beginns, tägliche Dauer, Umfang, Lerntempo kann jeder selbst bestimmen. Experten beraten schriftlich, individuell und nach jedem Lernschritt.

Kurskosten: 30,- DM

Bestellung: Einzahlung auf das Postgirokonto 61 150-466 beim Postgiroamt Dortmund.

Empfänger: Joachim Schrupp, Schmittingheide 17 d, 4400 Münster (Westf.)

EDS-Anschrift:

BSchule 440 Münster (Westf.).

Finnlando:

La Finnaj Fervojoj (VR) mendis dek novtipajn pasaĝervagonojn por long-distanca trafiko.

Esencaj novaĵoj pri tiuj veturiloj, estonte trafikantaj en rapidtrajnoj 160 km/h, estas unue la enirejoj kun tre malaltaj ŝtupoj, pli larĝaj pordoj kaj glitpordoj kun aŭtomataj pordofermiloj por manipulado pneŭmatika. La interna aranĝo plene noviĝis, la vagonoj estas tute klimatizitaj kaj por la varmaj someraj tagoj estas antaŭvidita unuopa aerumado. La proporcio de sidlokoj por fumantoj/nefumantoj estas dekkvin al sepdekdu en la dua klaso. En la unua klaso triono el la sidlokoj estas rezervitaj por fumantoj.

El „Schienen der Welt“
Tradukis Fritz Busse

Nekrologoj

La 11an de julio 1988 forlasis nin en Berlin

Ludwig Heintz

en aĝo de preskaŭ 90 jaroj. Li estis multjara fidela membro. Precipe konata li estis en la rondo de la emerituloj, kies ĉiujaran renkontiĝon li regule partoprenis malgraŭ la alta aĝo. Ĉiam li estis afabla kaj bonhumora. Tia ni tenu lin en nia memoro.

Li ripozu en paco!
Al la edzino ni esprimas sinceran kondolencan.

Post longdaŭra malsano mortis la 18an de aŭgusto 1988 nia membro

Hans Barnickel (67).

Ek de 1960 li estis membro de la loka grupo kaj la GEFA-organizo Lichtenfels. GEFA, IFEF kaj BELO perdis fidelan membron. Al lia familio kondolencis GEFA.

Redaktfino por n-ro 5/88 estas la 2.11.88